

## Paul Neergaard kaj la problemo de la scienca lingvaĵo

Carl STØP-BOWITZ (1913 12 08 – 1997 11 01)

Jam frue Paul Neergaard ekinteresiĝis pri serĉado de taŭgaj vortformoj de la tehniklingvaĵo, kiel atestas lia verŝajne unua publikigaĵo pri la temo: *Fremdvortoj en Esperanto. La 15-a regulo de la Fundamenta gramatiko en teorio kaj praktiko* (1933a). Sed estante mem sciencisto, botanikisto, li baldaŭ sin turnis al la problemoj de la faka scienca lingvaĵo. Neergaard ne ellaboris terminaron,<sup>1</sup> li simple ekuzis la lingvon verkante pri sciencaj temoj, publikigante jen sciencajn, jen popularsciencajn artikolojn. Kiel li mem skribis (1955b): “Nur la praktikado povas enblovi la spiron de la vivo en la proponitajn terminojn.” Siajn pensojn kaj vidpunktojn pri terminologiaj principoj, precipe en rilato al biologio, Neergaard kolektis en grava artikolo en *Scienca revuo* (1955b) kaj en sia ISU-prelego 1962 en Kopenhago (1963).

Liaj ĉefaj verkoj sendube estas la du libroj *Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj kaj kiel prilukti ilin* (1954c) kaj *La vivo de la plantoj* (1957). La unua estas faka verko por homoj interesiĝantaj pri ĝardenkulturoj; laŭdire okazis, ke ĝardenkulturistoj lernis Esperanton por povi utiligi tiun unikan verkon pri luktado kontraŭ malsanoj de plantoj. La dua estas kvazaŭ lernolibro de botaniko, sed verkita en preskaŭ poezia lingvaĵo, kies legado estas vera ĝuo por ĉiu, kiu interesiĝas pri la vivo de la naturo. Kiel trian ĉefan verkon oni povas mencii lian laboron kiel ĉefkunlaboranto de PIV pri botaniko, kie li prezentas la terminojn kaj plantnomojn, kiujn li tra la jaroj ellaboradis (bedaŭrinde li neniam sukcesis publikigi la korektojn de eraroj enŝteliĝintaj).

Dum multaj jaroj Neergaard estis estrarano kaj vicprezidanto de ISAE, kaj i.a. iniciatis kaj redaktis la jubilean libron *Sciencaj Studoj* okaze de la 50-jara jubileo de ISAE en 1958, en kiu multaj kunlaborantoj el plej diversaj sciencaj branĉoj prezentis originalajn studojn en Esperanto, uzante siajn fakterminojn.

En 1962 li aranĝis la Unuan Internacian Konferencon Esperantan de Sciencistoj en la kadro de la 47-a Universala Kongreso en Kopenhago, kaj plurfoje li prelegis en la Internacia Somera Universitato de la kongresoj.

---

<sup>1</sup>*Noto de la redaktoro:* Vidu tamen (1938).

## Bibliografio\*

Paul Neergaard (1907 02 19 – 1987 11 13)

- 1933a *Fremdvortoj en Esperanto. La 15-a regulo de la Fundamenta gramatiko en teorio kaj praktiko.* Parizo. 64 pp.
- 1933b Difinado de la vortoj *abio* kaj *piceo*. *Sennacieca Revuo* (nova serio) **1**, 9, 130–132.
- 1934\* La universala karaktero de Esperanto. *Sennacieca Revuo* (nova serio) **1**, 179–180.
- 1938\* *Terminaro hortikultura seslingva* (esperanta-dana-sveda-germana-angla-franca). Parizo. 29 pp.
- 1942\* La Esperantologio kaj ties disciplinoj. Taskoj kaj rezultoj. *En: Tra densa malumo*, pp. 37–64. Kopenhago: Laborista Esperanto Klubo.
- 1949 El la fronto kontraŭ la malamikoj de la kulturplantoj. *En: Somera Universitato, Malmö*, pp. 58–72. Rickmansworth (Hertfordshire), Anglujo.
- 1954a Virusmalsanoj en fruktoarboj. *Scienca Revuo* **5**, 3, 106–110.
- 1954b Ŝimfungoj en la hejmo. Liliputano rigardas ŝimfungetojn en la lando de la gigantoj. ISU Bournemouth. *Scienca Revuo* **6**, 2, 57–66.
- 1954c *Atakoj kontraŭ la ĝardenplantoj kaj kiel prilukti ilin.* Rickmansworth (Hertfordshire), Anglujo. 234 pp. + 9 falddabuloj.
- 1955a Kiel la sciencistoj donas nomojn al la plantoj? *Sennacieca Revuo* **83**, 45–48.
- 1955b Rimarkoj pri kelkaj terminologiaj principoj. Studo kun speciala konsidero al biontologio. *Scienca Revuo* **7**, 2, 43–58.
- 1957 *La vivo de la plantoj.* La Laguna. 128 pp.
- 1958 La saprofitaj fungoflaŭro de kelkaj hortokulturaj semspecoj. *En: Sciencaj Studoj*, Kopenhago, pp. 201–208.
- 1959 Interŝtata kunlaboro pri plantprotektado. ISU Haarlem 1954. *Scienca Revuo* **10**, 2/3, 85–95.
- 1962 La Unua Internacia Konferenco Esperanta de Sciencistoj en Kopenhago. *Scienca Revuo* **12**, 3/4, 133–134.
- 1963 La lingva problemo en la biologiaj kaj agronomiaj sciencoj. ISU Kopenhago 1962. *Scienca Revuo* **13**, 1–4 kaj 103–110.
- 1967 Internacia Esperanta Universitato 1967: Inaŭgura parolado. *Scienca Revuo* **18**, 4, 113–114.
- 1970 (Kunaŭtoro de:) *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto.* Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- 1986\* *Seed – A Horse of Hunger or a Source of Life?* (Reviziita eldono.) Kopenhago: Danish Government Institute of Seed Pathology for Developing Countries. [Speciale atentindas la sesa ĉapitro: Language Barriers and Corrosion of Communication in Science, pp. 114–140.]
- 1999\* La sencovasteco de kelkaj vortoj en Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Eseo por instigi al diskutado. *Esperantologio / Esperanto Studies* **1**, 16–20.

Verkita 1988 09; ricevita 1998 09

\*La verkoj (1934, 1938, 1942, 1986 kaj 1999) estas aldonitaj de la redaktoro.